

Enhavo

1	<i>János Bolayi</i> kaj la hungara kiel la perfekta lingvo (<i>László Marác</i>)	2
2	Terminologio	3
2.1	Pli videbla rolo por UEA en la terminologia mondo	3
2.2.	UEA invitas studentojn al terminologia trejnado en Vieno (<i>Mélanie Maradan</i>)	4
3	Festlibro por <i>Helmar Frank</i> : Kontribuoj serĉataj.....	5
4	El universitatoj	6
4.1	Instruado de Esperanto en universitatoj kaj altlernejoj – laŭ materialo de <i>Germain Pirlot</i>	6
4.2	En Humboldt-Universitato: Seminario “Ekonomio kaj lingvo”	8
4.3	La dua sesio de la Interlingvistikaj Studoj de UAM (<i>Ilona Koutny</i>).....	8
4.4	Pri lingvoj en la patentoficejoj: Disertacio de <i>Michele Gazzola</i>	9
4.5	<i>Cyril Brosch</i> – Doktoriĝo de interlingvisto pri la hitita lingvo.....	9
5	Pri la “Societo pri Interlingvistiko” (GIL)	11
5.1	21-a konferenco de GIL pri faka komunikado	11
5.2	Nova estraro de GIL	12
5.3	Bibliografio pri GIL.....	13
6	<i>Language Problems & Language Planning</i> – ankaŭ via revuo	13
6.1	Aperis nova numero de LPLP – speciala abon-oferto.....	13
6.2	LPLP – la volumo 35 (2011)	14
6.3	LPLP: Pli ol 9000 elŝutoj en du jaroj (<i>Humphrey Tonkin</i>)	17
7	Eŭropa lingvo-politiko	17
7.1	<i>European Journal of Language Policy</i> 2(2010)2 ĝis 3(2011)2.....	17
7.2	<i>Sandra Nífl</i> : Die Sprachenfrage in der Europäischen Union.....	19
7.3	<i>Ines-Andrea Busch-Lauer/Sabine Fiedler</i> : Sprachraum Europa.....	20

1 *János Bolyai kaj la hungara kiel la perfekta lingvo*¹

D-ro László Marác (Universitato de Amsterdamo)

En sia biografio pri la hungaraj matematikistoj, patro kaj filo *Bolyai, Farkas* (1775-1856) kaj *János* (1802-1860), la germana matematikisto Paul Stäckel en 1913 la unua atentigis pri tio, ke *János* provis konstrui ‘perfektan’ lingvon sur la bazo de sia gepatra lingvo, la hungara.

La ideo pri perfekta aŭ universala lingvo estis unu el la aro da projektoj, kiuj fontis en la kunlaborado inter la patro kaj la filo *Bolyai* en la malproksima transilvana urbo Marosvásárhely, la nuntempa Tirgu Mures en Rumanujo. Siatempe la urbo apartenis al la hungara parto de la habsburga imperio.

Patro *Farkas*, kiu instruis matematikon ĉe la Kalvinista Kolegio de Marosvásárhely, jam frue incisis la junan *János* en la sekretojn de sia disciplino, kiu, post la abiturienta ekzameno en 1817, ekstudis ĉe la imperiestra militara teknika altlernejo en Vieno. Tie li estis kaptita de la geometrio, pli specife de la postulaĵo pri la paralelaj linioj de Eŭklido, kiu dum dumil jaroj restis nesolvita. En 1832 *János* sukcesis pruvi ĝin.

Kvankam *János* ne komencis labori pri perfekta lingvo surbaze de la hungara pli frue ol en 1842, jam en 1823, la jaro en kiu li ekatakis la problemon de la postulaĵo pri la paralelaj linioj, li konsciiĝis pri la ambiguaĵoj en naturaj lingvoj, kiuj ĝenas la sciencan komunikadon kaj kelkfoje eĉ malebligas ĝin. Jam antaŭe *Farkas* pledis por tio, ke oni bezonas perfektan aŭ universalan lingvon por entute ebligi la sciencan interkomunikiĝon.

János formis por si koncepton pri lingvo, kiun hodiaŭ ni nomus semiologia, kaj supozis, ke naturaj lingvoj havas originon multe pli similan al matematika signosistemo. Tiun pralingvon li nomis la ‘gebrea’ (*géber* en la hungara), per kiu li videble vortaludis al la hebrea (*héber* en la hungara). Laŭ *János* la gebrea estis origine simpla kaj neambigua lingvo, kiu ekmontris ambiguaĵojn nur post kiam literaturistoj komencis misuzi ĝin. Sciencisto bezonus ne pli ol lingvon klaran, simplan kaj estetikan, en kiu la nocioj estu klare kaj precize difineblaj. Krom tio la lingvo estu ekonomia (malkomplika, ŝparanta al siaj uzantoj tempon kaj spacon), facile uzebla en la interkomunikiĝo kaj ĝi havu prononcon klaran, precizan, belan, agrablan kaj elegantan. Sen tia perfekta lingvo la scienco ne estus kapabla certigi al la homaro aŭtentan pliprospiriĝon.

János mem estis plurlingva kaj regis krom sia gepatra hungara la germanan, latinan, francan, italan kaj rumanan lingvojn. Kiel bazon por sia perfekta lingvo li elektis la gepatran, atentigante pri tio, ke la hungara posedas ‘celkonformajn trajtojn kaj signojn’, kiujn aliaj lingvoj liaopinie malhavas. Kvankam la hungara ne estis perfekta, laŭ li, ĝi posedis la plej bonajn proprecojn por fariĝi tia, estante pli simpla ol aliaj lingvoj. Li opiniis la hungaran elstare taŭga por krei novajn vortojn, kiuj estas bezonataj por doni nomon al novaj konatingoj. Tiucele *János* maksimume eluzis ĝian aglutinan sistemon de vortfarado surbaze de radikoj, kiu estis priskribita kaj analizita en la unua duono de la deknaŭa jarcento okaze de la modernigo de la hungara lingvo kadre de la nacia renovigo. Tiutempe ekravis Hungarujon la ideo de la Klerismo koncerne la instruadon de la propra lingvo. Estis fondita la Hungara Scienca Akademio kaj ties tasko fariĝis la kompilado de novaj vortaroj sur la bazo de la radikoj en la hungara leksiko. Patro kaj filo *Bolyai* ekdediĉis sin al la kreado de matematika terminaro en la hungara.

Cele al la konstruado de universala lingvo el la hungara estis dezirinde, laŭ *János*, ke la hungara estu plisimpligita kaj pliraciigita. Por diri la veron, li eklaboris super tio ne sen rigoro: necesis unue malkonstrui la hungaran, por ke ĝi estu rekreebla kiel perfekta lingvo. Li imagis, ke tio estos rapide efektivebla, sed reale tiu ĉi lingva malkonstruo-rekonstruo

¹ La originale nederlandan artikolon esperantigis Wim Jansen.

montriĝis tre peniga. Li proponis al si simpligon kaj raciigon en la kampoj de la alfabeto, la radikaro kaj la gramatiko. Tiel li projektis novan alfabeton, konservante la latinajn literojn, sed sur la bazo de la principo, ke ĉiu litero respondu al po unu sono kaj inverse. Li imagis, ke uzante la radikojn de la lingvo analoge al la matematikaj signoj, li estos kapabla kompili senambiguan leksikan bazon de la lingvo.

La provo de János Bolyai konstrui perfektan universalan lingvon el la hungara falas en la kategorion de la aposterioraj lingvoj, kies celo estas plifaciligi la internacian kaj la sciencan interkomunikiĝon. Apartenas al tiu ĉi sama kategorio planlingvoj kiel Esperanto kaj aliaj lingvoj konstruitaj sur la bazo de simpligitaj kaj raciigitaj gramatiko kaj leksiko de ekzistantaj lingvoj. Krom la hungardevena propono de la matematikisto János, ankaŭ la latindevena *Latino sine flexione* de la itala matematikisto Giuseppe Peano (1903) estas reprezentanto de la sama kategorio.

La propono de Bolyai koncerne la hungaran kiel perfektan lingvon neniam transpaŝis la sojlon de la loka biblioteko Teleki en Marosvásárhely, kiu konservas pli ol dekmilpaĝan manuskriptegon kiel postlasaĵon de János kun la notoj pri lia lingvoprojekto, surbaze de kiuj la aŭtoro de tiu ĉi kontribuo efektivas sian esploradon.

Referenco:

Marácz, László (2008): János Bolyai and Hungarian as the Perfect Language. *Octog8n Mathematical Magazine* vol 16. no. 1A, April 2008, p. 41-56.

2 Terminologio

2.1 Pli videbla rolo por UEA en la terminologia mondo

Nur kelkajn monatojn post sia aprila elekto kiel la komisiito por la rilatoj de UEA kun la Internacia Organizaĵo por Normigado (ISO) kaj kun Infoterm, *Mélanie Maradan* povis raporti al la Estraro de UEA pri pluraj atingoj.

En majo UEA kaj Infoterm subskribis interkonsenton pri kunagado. Infoterm estas malpli longa nomo de la Internacia Informejo por Terminologio, kiun Unesko laŭ iniciato de Eugen Wüster fondis en 1971 por subteni kaj kunordigi internacian kunlaboron en la kampo de terminologio. En ĝi membras naciaj, internaciaj kaj regionaj institucioj k.a. terminologiaj organizaĵoj. Laŭ la interkonsento UEA kaj Infoterm interŝanĝos informojn kaj kunlaboros pri projektoj, renkontiĝoj kaj eldonaĵoj pri terminologio, leksikografio, lingvistiko, lingvolernado kaj administrado de informoj kaj strukturitaj enhavoj.

Infoterm ankaŭ proponis al UEA traduki la dokumenton "Gvidlinioj pri terminologiaj politikoj" por apero en la retejo de Unesko. Infoterm atentigis UEA, ke la Eŭropa Patent-Oficejo (EPO) kaj Google faris interkonsenton pri maŝina tradukado de patentaj enhavoj al diversaj lingvoj. Infoterm sugestis al UEA provi kontakti Google cele al kunlaboro en tiu projekto, se kompetenta Esperanta lingvisto estos disponebla.

La strukturo de ISO enhavas multajn t.n. teknikajn komitatojn, kiuj okupiĝas pri la terminologia laboro de unuopaj fakoj kaj subfakoj. Unu el ili nomiĝas "Terminologio kaj pluaj lingvaj kaj sciaj datumoj" (ISO/TC 37). Ĝia ĝenerala celo estas atingi tutmondan semantikan kongruecon inter lingvaj datumoj en larĝa senco. Nuntempe ĝi laboras pri tiom larĝa spektro da taskoj, ke ĝi devis dividiĝi en kvar subkomitatojn (SC). La subkomitato "Principoj kaj kunordigado" (SC 1) ellaboras ĝeneralajn principojn de terminologio, lingvaj

enhavoj, terminologiaj politikoj kaj organizado de scioj, konsiderante kaj unulingvajn kaj plurlingvajn kuntekstojn. La tri aliaj subkomitatoj estas "Terminografiaj kaj leksikografiaj laborometodoj" (SC 2), "Sistemoj por administrado de terminologio, scio kaj enhavo" (SC 3) kaj "Administrado de lingvodatumoj" (SC 4).

UEA havas oficialajn rilatojn ekde 1991 kun TC 37. La efektiva normiga laboro tamen okazas en ĝiaj praktike sendependaj subkomitatoj, al kiuj necesas aparte membriĝi. Membreco en ili inkluzivas la eblon komenti ekz. ISO-normojn dum ilia evoluigo aŭ revizio kaj partopreni rilatajn renkontiĝojn. En majo 2011 *Mélanie Maradan* preparis dosieron por peti akcepton de UEA en ĉiuj subkomitatoj. Ĉiuj kvar subkomitatoj akceptis UEA kiel membron. Sekve UEA rajtas oficiale partopreni la normigan laboron. Krom ricevi aliron al ĉiuj informoj kaj okazaĵoj ene de la Teknika Komitato, UEA fariĝos videbla al terminologiaj fakuloj.

UEA jam komentis dokumenton de la subkomitato SC 2. La 38-paĝa dokumento temis pri tradukado, nome la kvalitkriterioj de tradukadaj procezoj kaj la kvalifikoj de profesiaj laborantoj en ili (tradukistoj, projektistoj, kontrollegantoj k.a.). En sia unua komento la komisiito de UEA emfaze atentigis pri la bezono publikigi ISO-dokumentojn en pli ol unu lingvo. Per tio ŝi celis montri, ke UEA kapablas fake kontribui kaj atentigi pri lingvaj problemoj.

Terminologia Esperanto-Centro de UEA: esperanto.net/tec/ Detala raporto:

http://esperanto.net/tec/2011_raporto_de_la_komisiito_pri_terminologiaj_instancoj.pdf

(Gazetara Komunikado de UEA, n-ro 440).

2.2 UEA invitas studentojn al terminologia trejnado en Vieno

Mélanie Maradan (UEA-komisiito pri terminologiaj instancoj)

Subtene al siaj junaj membroj kaj kongrue al siaj edukaj celoj, UEA ofertas al du studentoj la eblon partopreni la Someran Terminologian Trejnadon (TSS) dum julio 2012 en Vieno, Aŭstrio.² Temas pri unusemajna, neesperantista (anglalingva) aranĝo por lerni pri terminologio. Krom zorgi pri la administraj flankoj kaj laŭbezzone organizi la vojaĝon, UEA financos la aliĝkotizojn por la kursoj, la restadon en junulara gastejo kaj la vojaĝkostojn de la du studentoj.³

La terminologia scienco naskiĝis grandparte dank' al la laboro de la esperantologo kaj interlingvisto *Eugen Wüster*. Historie Esperanto kaj terminologio estas intime ligitaj. UEA, kiu celas daŭre pliampleksigi la kunlaboron kun ekstermovadaj terminologiaj instancoj, kuraĝigas siajn junajn membrojn interesiĝi pri la temo. Terminologio ĉiam ludas gravan rolon, kiam fakaj informoj aŭ scioj estas kreataj (ekz. per esploro), komunikataj (ekz. inter fakuloj), registrataj (ekz. en datumbanko), transdonataj (ekz. per instruado) aŭ serĉataj (ekz. per TTT). Ĉu "komputilo" aŭ "komputero"? Ĉu "Facebook" aŭ "Fejsbuk",



² Vidu : http://www.termnet.org/english/events/tss_2012/index.php.

³ Laŭ la kondiĉoj listigitaj en la oficiala informilo "UEA ofertas al du studentoj someran semajnon en Vieno por lerni pri terminologio". Vidu : <http://esperanto.net/tec/somera-terminologia-trejnado-2012.pdf>.

“iPhone” aŭ “saĝa poŝtelefono”? Por nia lingvo terminologiaj principoj aparte gravas. La du studentoj restos dum unu semajno en Vieno kaj dumtage ĉeestos kursojn en la Centro pri Tradukadoscienco de la Universitato de Vieno. La trejnado kutime logas partoprenantojn de pluraj kontinentoj. Mondkonataj instruistoj lumigos teoriajn bazojn de terminologio, sed ne nur: la partoprenantoj akiros sciojn pri modernaj aspektoj de la fako, la praktika laboro, la uzo de softvaroj, la kreado de terminologia datumbanko, la ekonomiaj flankoj de terminologio kaj la administrado de terminologiaj projektoj.

Ĉefaj informoj resume:

Kio: Somera Terminologia Trejnado (TSS)

Kie: Vieno, Aŭstrio

Kiam: de la 8-a ĝis la 14-a de julio 2012

Kiuj: studentoj, kiuj membras en UEA

Kial: por lerni pri terminologio

Kiom: subvenciita de UEA (detaloj sub “Informiĝi”)

Kiel: interesitaj studentoj sendu teskton, kiu priskribas la motivojn, poste la UEA-Estraro elektos du studentojn surbaze de la motivoj

Limdato: la 8-a de aprilo

Informiĝi: www.esperanto.net/tec kaj maradan@uea.org

Kandidatiĝi: maradan@uea.org

3 Festlibro por Helmar Frank: Kontribuoj serĉataj



AKADEMIA LIBROSERVO

Institut für Kybernetik ,
Kleinenberger Weg 16
D-33100 Paderborn
Tel. +49-(0)5251-64200
Fax +49-(0)5251-8771101
vera.barandovska@uni-paderborn.de

Estimataj sciencaj gekolegoj,

Sehr geehrte wissenschaftliche Kollegen,

okaze de *okdekjariĝo de Prof. Helmar Frank* ni planas eldoni **festlibron** kaj petas vin kontribui per

zum *achtzigsten Geburtstag von Prof. Helmar Frank* möchten wir eine **Festschrift** veröffentlichen. Wir bitten Sie um einen Beitrag in Form:

1. Scienca artikolo:

Temoj : ĉiuj fakoj , laŭ AIS- sekcioj:

1. kibernetiko
2. humanistiko
3. struktursciencoj
4. filozofio
5. natursciencoj
6. morfosciencoj

Lingvoj: dulingve, en via preferata (aŭ gepatra) lingvo kaj en Esperanto. Esceptokaze ni mem esperantigos.

1. eines wissenschaftlichen Artikels:

Themen: alle Fächer, laut AIS-Fachbereichen:

1. Kybernetik
2. Humanistik
3. Strukturwissenschaften
4. Philosophie
5. Naturwissenschaften
6. Morphologische Wissenschaften

Sprachen: Zweisprachig, in ihrer Muttersprache und Esperanto. Nach Bedarf übersetzen wir selbst in Esperanto.

Amplekso : ĉ. 5 paĝoj en unu lingvo.
Limdatoj: 10-15-linia **resumo**, prefere anglalingva, ĝis la *20-a de aprilo 2012*, al: vera.barandovska@uni-paderborn.de, de kiu vi tuj ricevos detalajn direktivojn, **plena teksto ĝis la 1-a de septembro 2012**

kaj /aŭ

2. Tabula gratulatoria :

financa subteno: via nomo listiĝos en la gratul-listo kun via scienca titolo/nomo/urbo/landokodo. Por 50,- EUR vi ricevos vian personan libroekzempleron (bv. sciigi vian adreson). Bv. pagi al la konto 8821960400 de Institut für Kybernetik ĉe Volksbank Paderborn, BLZ: 47260121, IBAN: DE 59472601218821960400, BIC: DGPBDE3MXX (eventuale al vrbr-l ĉe UEA) ĝis la *1-a de septembro 2012*, kun indiko: Festlibro Frank kaj via nomo. Ni sincere dankas por via kunlaboro kaj antaŭĝojas vian kontribuadon.

Akademia Libroservo

Umfang: ca. 5 Seiten in einer Sprache.

Termine: einen 10-15 Zeilen langen **Knapptext**, bevorzugt auf Englisch, bis zum *20. April 2012*, an: vera.barandovska@uni-paderborn.de, die Ihnen genaue Richtlinien mitteilt, **den kompletten Text bis zum 1. September 2012**

und/oder

2. einer Tabula gratulatoria:

mit einem finanziellen Beitrag: Ihr Name erscheint in der Gratulanten-Liste , mit Ihrem wiss. Titel/Namen / Stadt / Landescode. Für 50,- EUR erhalten Sie Ihr persönliches Buchexemplar (Bitte, teilen Sie Ihre Anschrift mit). Bitte, zahlen Sie auf das Konto 8821960400 von Institut für Kybernetik bei Volksbank Paderborn, BLZ 47260121, IBAN: DE 59472601218821960400, BIC DGPBDE3MXX, (eventuell an vrbr-l bei UEA) bis zum *1. September 2012*, mit der Angabe: Festschrift Frank und Ihrem Namen. Wir bedanken uns herzlich für Ihre Zusammenarbeit und freuen uns auf Ihre Beiträge.

Akademia Libroservo

(sendis: *Věra Barandovská-Frank*)

4 El universitatoj

4.1 Instruado de Esperanto en universitatoj kaj altlernejoj - laŭ materialo de *Germain Pirlot*

Dum multaj jaroj *Germain Pirlot* kompilas internaciajn superrigardojn pri la ekzisto de esperanto-kursoj, oficiale organizataj en universitatoj kaj altlernejoj. Lia laboro estas aparte grava, kvankam ne mankas malfacilaĵoj en la kompilado de la superrigardoj, ĉar ne ĉiuj kursgvidantoj reagis limdate.

Ipŝi fakte ne aparte okupiĝas pri instruado de la lingvo Esperanto – tio ja estas la tasko de ILEI – sed klopodas konigi informojn pri la trakto de Esperanto kiel scienca objekto, ankaŭ kadre de lingvopolitikaj medioj kaj kadroj. Pro la multjara sindediĉa laboro de *Germain Pirlot* ni tamen donu almenau resumon de la lasta enketo.

Enkonduke ni citu parton el teksto de *Dennis Keefe* pri la lasta raporto:

...

Kiam *Germain Pirlot* komencis kompili tiun raporton en la jaro 1977, troviĝis tiutempe 58 universitataj kursoj de nia lingvo en 21 landoj. La nombro de landoj kaj de universitatoj variadis dum la lastaj pli ol 30 jaroj, atingante sian plej altan nivelon en 1987, kun 28 landoj kaj 125 kursoj. La universitataj kursoj gravas laŭ multaj vidpunktoj.

Unue, ili montras, ke Esperanto akceptiĝas en universitatoj kaj ke oni konsideras ĝin studinda temo.

Due, tiuj kursoj valoras por altiri junulojn, esperantistgi ilin, kaj tial doni pli da edukitaj lernantoj al nia komunumo.

Trie, la profesoroj kiuj instruas tiujn kursojn, estas ofte pagataj kiel ĉiuj aliaj profesoroj, kaj tio donas al esperantistoj la ŝanĉon pli bone vivteni sin kaj dediĉi sin pli al Esperanto. Ankaŭ menciindas, ke tiuj kursoj permesas al niaj instruistoj verki materialon, eksperimenti kaj ĝenerale plibonigi siajn instruajn kapablojn. Kaj finfine, ni ne forgesu, ke tiuj statistikoj estas gravaj por niaj rilatoj kun neesperantistaj amaskomunikiloj.

La rolo de statistiko en ĉiu sana organizo estas grava. Sen statistikoj registaroj, firmaoj kaj neprofitcelaj organizoj perdiĝos, ne sciante ĉu ili atingas aŭ ne atingas siajn celojn. Se ne ekzistas mezuriloj, ne nur estas malfacile prijuĝi rezultojn, ankaŭ estas malfacile motivigi individuojn al celstreba laboro. Parte en tio ankaŭ kuŝas la valoro de la raporto de Sinjoro Pirlot pri oficialaj kursoj.

Estas multe da statistikoj kiuj estas aŭ estos utilaj por la Esperanto-Movado. La nombro da homoj kiuj ĉeestas la Universalajn Kongresojn, ekzemple. La Esperanto-Movado bezonas, tamen, multe pli da statistikoj por helpi al ni kunordigi nian laboron kaj motivigi nin.

Ni pensu ankaŭ pri statistikoj pri aperado de artikoloj pri Esperanto, laŭ lando, en amaskomunikiloj.

La ekzemplo pri kiamaniere starigi sistemon por la bona kompilado de tiaj kaj aliaj valoraj statistikoj videblas en la sistemo kreita de *Germain Pirlot*.

Unue, li elektas gravan kategorion: la instruadon de Esperanto je universitata nivelo.

Due, li kompiladas la statistikojn utiligante plejparte la samajn kriteriojn jaron post jaro. Tio helpas al ni kompari rezultojn.

Trie, li strebas al longdaŭra laboro, ĉar ĝuste en tiu longa tempo eblas eltiri konkludojn kaj poste labori por plibonigi kaj alĝustigi la agadomanieron kaj la rezultojn. Fari tian laboron estas granda, kaj fakte tiel granda, ke li bezonas la subtenon de ni ĉiuj...

Menciindas, ke la posta starigo de sistemo por kompili statistikon ĉe www.edukado.net ankaŭ estas meritplena laboro, kaj baldaŭ eble vidiĝos maniero kunmeti la laboron de *Germain Pirlot* kun tiu de *Katalin Kovats*.

Ĉiaokaze, ĉiam bezonatas pli kaj pli da atento ĉe la movadestroj pri tiaj statistikoj. La Estraro de UEA eble devas diri al ni ĉiuj, ke ili kredas, ke tiuj nombroj gravas, kaj ke la Estraro utiligos ilin por pli bone koni la nunan situacion kaj por pli bone plani nian futuron.

Disvolviĝo de la kursoj inter 1977 kaj 2012

G. Pirlot, *Oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo* [poŝta kompilado]

(Klarigo ĉe la ekzemplo de 1977: 21-58 = 21 landoj/ 58 kursoj)

1977 : 1-a eld., dec. 1977 [21-58]
1980 : 2-a eld., jan. 1981 [19-51]
1981 : 3-a eld., jan. 1982 [15-56]
1983 : 4-a eld., dec. 1983 [17-79]
1984 : 5-a eld., dec. 1984 [22-109]
1986 : 6-a eld., jun. 1986 [28-125]
1988 : 7-a eld., jun. 1988 [24-107]
1990 : 8-a eld., jun. 1990 [19-91]
1992 : 9-a eld., jun. 1992 [23-90]

G. Pirlot, *Esperanto-kursoj en universitatoj kaj altlernejoj*[reta kompilado]

2002 : nov. [20-43]
2004 : febr. [23-63]
2006 : jan. [26-75]
2008 : jan. [24-68]
2010 : jan. [21-56]
2012 : jan. [19-50]

Kontakto al Germain Pirlot: gepir.apro.@.pandora.be

La listo de januaro 2010 konsulteblas ĉe:

- <http://www.egalite.hu/>
- <http://www.ipernity.com/blog/32119/234890>

Ĉu temas „nur“ pri Esperanto-kursoj aŭ ankaŭ pri enkondukoj en interlingvistikon kaj esperantologion kiel sciencaj objektoj? Tiu „nur“ neniel malgravigu la ekziston de Esperanto-kursoj en universitatoj kaj altlernejoj. Tamen necesas ankaŭ instrui la sciencon pri planlingvoj kaj la rilatajn aspektojn (interlingvistiko), aparte pri Esperanto (esperantologio). En la informoj pri jenaj universitatoj troviĝas indikoj pri tiaj temoj:

- Karlovo/Bulgario (prof. *Bojidar Leonov*)
- Torino/Italio (d-ro *Federico Gobbo*)
- Zagreb/Kroatio (prof. d-ro *Velimir Piškorec*)
- Ŝiuliai/Litovio (prof. d-ro *Aloyzas Gudavičius*)
- Amsterdam/Nederl. (prof. d-ro *Wim Jansen*)
- Krakow/Pollando (mag. *Maria Majerczak*)
- Poznań/Pollando (prof. d-rino *Ilona Koutny*, vidu la ĉapitron 4.3 ĉi-kajere)

4.2 En Humboldt-Universitato: Seminario „Ekonomio kaj lingvo“

Jam kelkajn fojojn la profesoro pri ekonomiko, d-ro *Bengt-Arne Wickström* de Humboldt-Universitato en Berlin, en la menciita universitato realigas seminarion pri la rilatoj inter ekonomio kaj lingvoj. La seminario kutime okazas dum la vintra semestro, tiel ankaŭ 2011/2012. Post kelkaj enkondukaj prelegoj la studentoj elektas temon el longa listo, devas prilabori ĝin en formo de eseo kaj prezenti prelegeton dum la seminario. La rezultoj de la eseo kaj prelegeto estas pritaksataj kaj havigos poentojn. La studentoj ricevas ampleksan liston kun fakliteraturaj titoloj, inter ili ankaŭ pri planlingvoj. La prezentitaj eseoj ofte estas tute interesaj.

Parto de la ĉefe germanaj (sed foje ankaŭ anglaj) eseoj troviĝas en la reto:

([http://www.wiwi.hu-berlin.de/professuren/vwl/fw/Dissertationen, Theses_und Seminararbeiten/Seminararbeiten/Oekonomie und Sprache](http://www.wiwi.hu-berlin.de/professuren/vwl/fw/Dissertationen,_Theses_und_Seminararbeiten/Seminararbeiten/Oekonomie_und_Sprache)).

4.3 La dua sesio de la Interlingvistikaj Studoj de UAM

Inter la 28a de januaro kaj la 3a de februaro 2012 okazis la dua sesio de la nova interlingvistika grupo en la Universitato Adam Mickiewicz, en Poznano. 18 gestudentoj el 10

landoj – inter ili 5 brazilanoj – vigle diskutis pri kulturaj kaj lingvistikaj temoj, krome alfrontis la unuajn ekzamenojn.

La kurso pri *ĝenerala morfologio kaj sintakso* de *Michael Farris* enkondukis la partoprenantojn en la strukturon de diversaj lingvoj, konsciigis ilin pri la kategorioj de la propraj gepatraj lingvoj. La kurso pri *esperanta gramatiko* de *Ilona Koutny* vekis la diskutemon de la gestudentoj (ekz. ĉu niaj pensoj bezonas gramatikan karakteron por vortiĝi?).

La *duan periodon de esperanta literaturo* skizis la krakova poetino *Lidia Ligeza* (poezio) kaj la literatura tradukisto *Tomasz Chmielik* (prozo). La kurso pri *komunikado* – post prezento de la gamo de komunikado de individua ĝis internacia – sub la gvido de *Ilona Koutny* donis eblecon al la ĉeestantoj por prezenti siajn komunikadkutimojn en diversaj situacioj. La kurson sekvis kultura vespero kaj ekskursoj.

(Laŭ raporto der *prof. habil. Ilona Koutny*, ikoutny@amu.edu.pl).

4.4 Pri lingvoj en la patentoficejoj: Disertacio de Michele Gazzola

Antaŭ nelonge la itala ekonomikisto kaj lingvopolitikisto *Michele Gazzola* prezentis jenan doktoran disertacion:

Gazzola, Michele (2011): *The Economic Evaluation of Efficiency and Fairness in the Management of Multilingual Communication: The Case of Patent Offices*.

Université de Genève, 532 p. Gvidantoj de la disertacio: *Prof. François Grin*, Université de Genève kaj *Prof. François Vaillancourt*, Université de Montréal (defendita 19.9.2011).

Resumo:

La ekonomika taksado de efikeco kaj justeco en la administrado de plurlingva komunikado: la kazo de patentaj oficejoj.

La disertacio prioponas teorian ĝeneralan kadron por taksu la efikecon kaj la justecon de tiuj lingvaj politikoj, kiuj celas administri la lingvan diversecon en la interna kaj ekstera komunikado de interaciaj organizaĵoj. “Komunikado”, en tiu ĉi kazo, necese signifas plurlingva komunikado, t.e. komunikado inter agantoj kiuj ne havas la saman gepatran lingvon. Sekve, oni aplikas la teorion kadron al la analizo de la lingvaj reĝimoj (aŭ “sistemoj por administri plurlingvan komunikadon”) de la Tutmonda Organizaĵo pri Intelektua Proprietaĵo kaj de la Eŭropa Patenta Oficejo. La rezultoj montras, ke pli plurlingva lingva reĝimo povas esti samtempe pli efika kaj justa ol malpli plurlingva reĝimo.

4.5 Cyril Brosch – Doktoriĝo de interlingvisto pri la hitita lingvo

Cyril Brosch naskiĝis la 8-an de aŭgusto 1981 en la germana urbo Wertheim/Main.

Post studoj de kompara hindeŭropa lingvoscienco kaj antikva orientalismo en la universitato de Würzburg, li daŭrigis siajn studojn en Humboldt-Universitato kaj Freie Universität [Libera Universitato] (ambaŭ en Berlino). Li krome pasigis semestron en Adam-Mickiewicz-Universitato, Poznań. Li ankaŭ partoprenis kurson de la Internaciaj Interlingvistikaj Studoj en la sama universitato. La disertaciojn, por akiri la gradojn de magistro kaj doktoro, li verkis pri problemoj de la hitita lingvo. La 16-an de decembro 2011 li defendis la doktoran disertacion kaj akiris la plej altan noton “summa cum laude”. La disertacio havas resumojn en la lingvoj pola, angla kaj en Esperanto. En kelkaj lokoj de la disertacio Esperanto estas menciita, sub

kompara vidpunkto. Cyril Brosch nuntempe estas scienca laboranto en la universitatoj de Würzburg kaj Marburg.

Li estas membro de „Indogermanische Gesellschaft e.V.“ (Hindeŭropa Societo) kaj de „Gesellschaft für Interlinguistik e.V.“ (Societo pri Interlingvistiko) (ekde 2011 kiel membro de la estraro).

Publikaĵoj

- 2003: „La etimologia vortaro de Vilborg“. *Esperanto aktuell* 3/2003, p. 20 (recenzo pri: Ebbe Vilborg. 1989-2001. *Etimologia Vortaro de Esperanto*, Bdd. 1-5, Malmö: Eldona Societo Esperanto).
- 2006: „La klingona lingvo el tipologia vidpunkto“. *Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft* 47/2, 69-74.
- 2006b: „Zum Projekt eines linguistischen Wörterbuchs in der Internationalen Sprache“. En: Detlev Blanke/Jürgen Scharnhorst (Ed.), 2006. *Sprachenpolitik und Sprachkultur*. Beiträge der gemeinsamen Tagung des Vereins zur Förderung sprachwissenschaftlicher Studien e.V. und der Gesellschaft für Interlinguistik e.V. am 29. Oktober 2005 in Berlin sowie der 15. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 28.-30. Oktober 2005 in Berlin. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik (*Interlinguistische Informationen, Beiheft 13*), 207-210.
- 2008a: „Nominalkomposita und kompositionsähnliche Strukturen im appellativen Wortschatz des Hethitischen“. Berlin: Elektronika publikaĵo: <http://edoc.hu-berlin.de/master/brosch-cyril-2008-01-21/PDF/brosch.pdf>, 150 p.
- 2008b: Traduko de: Popko, Maciej. *Völker und Sprachen Altanatoliens*. Wiesbaden: Harrassowitz, 170 p.
- 2008c: Kunlaboro: Koutny, Ilona. *Germana-Esperanta-Pola etvortaro pri lingvo kaj komunikado*. Poznań: Prodruk (Celtrafo GEP 2), 138 p.
- 2008d: Vortfarado el la vidpunktoj de la hindeŭropista lingvoscienco kaj de esperantologio. (Nepublikigita diplomlaboraĵo. Poznań: Adam-Mickiewicz Universitato, 49 p.
